

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIUJO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktoro: N. BARTHELMESS
Colmstrasse 1, Leipzig-StötteritzGvidanto: Ekzekutiva Komisiono de SAT
23, rue Boyer, Paris XXAdministranto: R. LERCHNER
Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Masoj ekmoviĝis

Rimarkinda kaj ĝojiga fakto okazas nun en Sovetio. Eble unuan fojon en historio — ne turistoj, ne burĝaj vojaĝantoj — sed masaj laboristaj grupoj de plej diversaj nacioj kaj partiooj sin direktas en laboristan respublikon, por persone, per propraj okuloj ekvidi, kion ĝi atingis, kaj konvinkiĝi, ĉu justaj estas la atakoj kaj kulpigoj de burĝa gazetaro. Ni ĉeestas interesan proceson. Iom post iom proletariaro komencas liberiĝi de magia influo de gazetaro kaj de siaj gvidantoj. Unuflanke — senĝena plena de malamo atako, kiu nevole naskas pluson pri kalumnio — kaj de alia flanko eble troigitaj diframboj al la sama sistemo, kiu ankaŭ ne povas ne elvoki skeptikecon. Restas sola rimedo — konvinkiĝi mem.

Kaj laboristaro larĝe ekuzis tiun metodon. En la gastame malfermitaj pordoj de Soveta respubliko unu post alia eniras novaj delegacioj: ne ankoraŭ forveturis la delegacio de anglaj laboristinoj, kiam alvenis franco-belgaj delegitoj. Nun jam trapasis Sovetlandon germanaj laboristoj en plej diversajn direktojn, kaj en la sama tempo 300 svedaj kamaradoj. Ni esperu, ke ili ne estis la lastaj.

Post entuziasmaj renkontoj komenciĝis serioza laboro. Dividite en komisionoj, ili plej atente kaj profunde studis la sovetan vivon: fabrikojn kaj uzinojn, sindikatojn, kondiĉojn de laboro, sistemon de sekurado, laboristajn domojn, kulturajn kaj sportajn organizaĵojn, infanmovadon, laboristajn ripozejojn ktp. ktp. Mi ĉi tie ne intencas paroli pri la rezultoj de tiuj vizitoj. Certe, la kamaradoj jam scias, ke la ekonomia kaj kultura progreso en Sovetio, la proceso de senĉesa kresko, forte impresis la laboristaron, kiu mistifikita de sia gazetaro tute

ne tion esperis trovi en Sovetio. Mi eble ne eraros supozante, ke multaj el ili opiniis riski sian vivon, veturinte en landon de GPU, Ĉ.K., en landon de barbara diktatoreco ktp.

Sed ne tio nur estas grava, ke la muro de kalumnioj disfalis. Sendube, la plej rimarkinda en tiuj ĉi vizitoj estas la senpera renkonto de diversnaciaj fratoj laŭ laboro kaj batalo, ne dum la milito, ne en malamikaj remparoj, kiel okazadis ĝis nun, sed en plej favoraj por kresko de solidareco kaj amikeco kondiĉoj. Unuan fojon en historio laboristoj kiel mastroj akceptas siajn karajn gastojn. Ĉu oni devas miri pri la entuziasmo de renkonto, la nesatigebla intereso de unu al alia, la miloj da demandoj? Ne intervjuado pere de gazetaj raportistoj, sed reciproka intima parolado... pere de tradukantoj! Jen la historia fatalaĵo de niaj tagoj, kiu neniam ankoraŭ ŝajnis tiel maldolĉa, kiel en nunaj cirkonstancoj.

Mano ĉe Mano, dividitaj nek de limoj, nek de polico aŭ spionoj, kiom intima, riĉenhava kaj signifplena povus esti tiu renkonto. Kiom da aferoj estus priparolitaj, kiom da duboj disblovitaj, kaj kiel la vero — ne pompe ornamita gazeta veraĵo, sed efektiva proletaria vero, kiun tiel avide serĉas nun la internacia laboristaro, estus aperinta al ili!...

Por tio mankas nur bagatelo — reciproka interkompreno.

Kian moralan triumfon ĝuis la laboristoj, kiuj kunvenis dum la Kongreso en Vieno!

Jen, kial ankoraŭ neniam estis bezonata la vigla, insista laboro de nia SAT-anaro inter laboristaj vicoj kiel nun. La serio de vizitoj al Sovetio nur komenciĝis.

Novaj, pli vastaj laboristaj rondoj veturos al ni.

Kaj ni devas zorgi, ke en tiun delegacion nepre eniru esperantistoj. Pli alte, pli kuraĝe ni aŭdigu nian voĉon por esperanto inter laboristaj masoj, ĉar nun jam neniu kuraĝos diri, ke proletaro ne bezonas internacian lingvon.

Se iu ĝin nepre bezonas nun, do nome la proletaro, kaj per ĉiuj rimedoj tion kredigi al ĝi — estas nia devo.

I. Lisiĉnik (Kiev).

Mizera stato de litovaj vilaĝoj

Terkulturo en Litovio. — Terkulturaj lernejoj. — Malklereco. — Influo de pastroj kaj religio. — Kooperacia movado. — Grandaj impostoj sur vilaĝoj. — Malriĉaj vilaĝanoj. — Elmigrado. — Perspektivoj de socialismo.

Litovio estas terkultura lando. 77% da tuta loĝantaro loĝas en vilaĝoj kaj plugas la nigran teron patrinon. Bedaŭrinde, litovaj vilaĝoj estas nestoj de malklereco kaj mizero. Oni kulturas la teron per primitivaj iloj. Lignaj plugiloj kaj lignaj erpiloj estas ankoraŭ ĉie troveblaj. Terkulturaj maŝinoj, eĉ dusulkaj plugiloj ne vizitas nian vilaĝon. Nur en bienoj ili estas troveblaj. Kaj la vilaĝanoj, posedantaj po 5—15 hektaroj, ne havas monon por ilin aĉeti. Plejparto da kamparanoj vivas laŭ malnova kutimo en komunaj vilaĝoj po 20—40 familioj, kaj iliaj kampoj estas dividitaj en longajn kaj tute mallarĝajn (ofte nur 3-metrajn) terpecojn; nu, tiajn terpecojn oni eĉ ne povas kulturi per maŝinoj. Nur dum la lastaj jaroj oni rapidas disdividi la grandajn kaj neoportunajn vilaĝojn en apartajn terpecojn por ĉiu familio. Sed tiu-ĉi disdividado estas malutila por senteruloj. Ĝis nun ili povis almenaŭ uzi la komunajn paŝtejojn. Sed post disdivido de vilaĝo ili ricevas nur ĝardeneton, kaj la paŝtejojn forprenas de ili la "sankta posedraĵo."

Litova tero estas malfruktodona, kaj la kamparanoj malmulte zorgas pri ĝia fruktonigo. Mankas al ili klereco, mankas sperto. Kie ili ĉion-ĉi ĉerpu? En la terkulturaj lernejoj — estas sola respondo. Sed en la tuta lando estas nur 8 terkulturaj lernejoj kaj ankoraŭ 2 por virinoj (kune do 10). Tio ja estas "pardon-ebla". La registaro havas multe da "gloraj" elspezoj — por giganta armeo, por ŝtataj aŭtomobiloj, por ministraj cilindroj — kie do ĝi prenu monon por tiuj ĉi "aĉaj" terkulturaj lernejoj?

Brutbredado ankaŭ donas al niaj kamparanoj nenian profiton. La ĉefa kaŭzo — laktproduktado ne estas organizita. Ĉiu familio produktas buteron kaj alion aparte per primitivaj metodoj, sen iaj maŝinoj. Komence de ĉi-jaro estis en la tuta lando nur 39 kulturaj kooperaciaj laktejoj. Mankas specialaj lernejoj, mankas ankaŭ spertuloj organizantoj.

Malklereco regas en niaj vilaĝoj: 45,6% da kamparanoj estas analfabetuloj, 23,2% scipovas nur legi, kaj nur 31% scipovas legi kaj skribi. Libroj, eĉ plej popularaj, ne disvastiĝas inter vilaĝanoj. Solaj libroj, troveblaj en litova vilaĝo, estas: religiaj libroj kaj kalendaroj. Gazetojn preskaŭ neniu legas, eble nur 2 aŭ 3 el 100 plenaĝuloj. Ĉio-ĉi prezentas bonan kampon por religia fanatikeco kaj diversaj superstiĉoj. Pastro estas por plimulto plej granda aŭtoritato. Pastro estas ilia konsilanto dum parlamentaj balotoj, al pastro ili fordonas mortante ĉiun per sanga ŝvito kolektitan monon por "prizorgo" de postmortaj aferoj. La solaj lumportantoj en niaj vilaĝoj estas popollernejoj, sed ili estas ankoraŭ maloftaj. 4 aŭ 5 vilaĝoj havas nur unu popollernejon. Sed ankaŭ ĉi-tien la burĝa-pastra registaro ŝovas sian manon. Socialist-emaĵn instruistojn la ministerio por klerigo ne toleras. Se la socialistoj-instruistoj aŭdigas sian voĉon, tuj la fanatikuloj denuncas ĉi-tion al pastro, pastro al registaro, — kaj baldaŭ instruisto estas forigita el sia ofico. La burĝaj instruistoj ne ligiĝas kun loka junularo kaj lasas ĝin droni en drinkemeco kaj malklereco. Ili organizas naciecajn aŭ klerikalecajn organizaĵojn, kiuj ne klerigas junularon, sed nur altrudas al ĝi aĉan ŝovinisman kaj profundigas ĝian fanatikecon.

Menciinda estas abundeco de gimnazioj en Litovio. Sed tiuj gimnazioj estas malbone aranĝitaj kaj havas skolastikan karakteron: deviga latina lingvo (ne ĉie), devigaj religi-lectionoj, neniam praktiklaboroj, parker-lernado ktp. La nespertaj vilaĝanoj kondukas tien siajn infanojn, por ke ili fariĝu "sinjoroj". Sed baldaŭ la patroj disreviĝas. Ok jarojn studinta vilaĝanfilo neniam profitas. Li ricevas nenian specialecon, kaj la universitataj studoj estas por malriĉa vilaĝano tro multekostaj. Mizero rikanas antaŭ li.

Kooperacia movado ankoraŭ nur embrias en litovaj vilaĝoj. La fervoruloj organizas ialoke kooperaciajn terkulturajn asociojn. Ĝis nun en tuta lando ekzistas ĉirkaŭ 170 tiaj asocioj. Kelkaj el ili prospere

laboras, sed multaj pro manko da spertaj gvidantoj restas nur sur papero. Iom pli multenombraj estas kooperaciaj konsumasocioj: en ĉiu urbeto estas almenaŭ unu kooperacia butikoj. Kaj la neorganizitaj vilaĝanoj (plejmulto) vendas ĉiujn siajn produktojn al judaj komercistoj, plej aĉaj trompemuloj; ĉe la samaj judoj ili aĉetas necesajn por si produktojn. Tiuj-ĉi perantoj havas en malklera Litovio tre bonan vivon, do ilia nombro estas ankaŭ granda. En tuta Litovio estas ĉirkaŭ 18200 privataj komercaj institucioj, do ĉiuj 109 loĝantoj¹⁾ nutras unu peranton.

Pri politiko plejmulto da litovaj vilaĝanoj havas nenian komprenon, precipe maljunuloj. Ili eĉ ne scias, ĉu prezidanto, ĉu reĝo regas Litovion, ili ne scias, kia diferenco estas inter respubliko kaj monarkio. Nur militoj interesas nian vilaĝanon. Ekvidinte homon, legantan gazeton, vilaĝano demandas: "Ĉu ne aŭdigas milito?" Ricevinte nean respondon, li foriras trankviligita. Kiu naskas ĉi-militojn, li ankaŭ ne pensas. "La reĝoj kunvenas kaj decidas militi", — diras vilaĝano senpripense: — "Politiko ne estas nia afero. "Sinjoroj" pensu pri tio. Ni do laboru, suferu kaj silentu." Pri socialismo niaj vilaĝanoj malmulte aŭdas, kaj ankoraŭ pli malmulte komprenas. Nur junularo sub gvidado de iu gimnaziano aŭ instruisto organizas ie socialisteman rondeton. Sed tuj ekaŭdas pastro kaj ekmalbenas la socialistojn dum prediko per plej maldecaj vortoj (ĉio estas en ordo: la preĝejoj estas ĉe ni veraj mitingejoj!). La fanatikaj paroĥanoj kredas, kaj "la ciciliko" fariĝas en ilia fantazio veraj monstroj, senmoraligintaj homoj kaj simile. La junularo kompreneble malmulte atentigas pastrajn vortojn.

Registaro premas vilaĝanojn per grandaj impostoj. Vilaĝanoj ofte ne havas monon por pagi. Tiam venas policisto, skribas ion en sian notlibron, kaj post kelkaj semajnoj aŭkcio estas vendataj preskaŭ la lasta brutaro aŭ terkulturiloj de vilaĝano. Sed eĉ tiuj ĉi grandaj impostoj ne sufiĉas por kovri la luksajn elspezojn de ŝtata buĝeto. Do la registaro decidis vendi la solan landan riĉaĵon: nome la arbarojn. Arbaroj kovras 14% da tuta litova teritorio. Tio ne estas multa. Vilaĝanoj plendas, ke mankas ligno por hejtado kaj domkonstruo, kaj la financa ministro ekspedas la lastajn arbarojn eksterlanden kaj ĝojas, ke litova buĝeto estas "sen deficito". En la jaro 1923 la lignoeksperto konsistigis 28,8% da tuta litova eksporto, nun eble la samon. Baldaŭ Litovio aĉetos lignomaterialon en eksterlando. Sed la registaro, antaŭsentante sian agonion, pensas, kiel Ludoviko XV: "Por ni sufiĉos, post ni estu superakvego!"

En la litovaj vilaĝoj vivas ankaŭ senteruloj. Ilia vivo estas plej mizera. Dum labormonatoj (dum fojn- kaj sekalfalĉado) ilin dungas la pli riĉaj vilaĝanoj ofte por plej malgranda salajro. La dungatoj ricevas

¹⁾ 25 familioj.

la manĝaĵon kaj tagan salajron: viro ĉirkaŭ 4 lidojn, virino ĉirkaŭ 2 lidojn (1 dolaro = 10 lidoj). Kaj dum la vintro, kiam neniu ilin dungas, la vilaĝaj senteruloj estas veraj urbaj senlaboruloj, ili preskaŭ malsatas. Kion do ili faras? Virinoj ŝpinas, konkurante kun la ŝpinmaŝinoj kaj perlaborante nur 1/2—1 lidon potage. Viroj okupiĝas per diversaj proprasperte lernitaj metioj, ankaŭ preskaŭ nenion perlaborante. Kial do ili ne lernas profitdonan metion? Ĉar en Litovio ekzistas neniam metiaj lernejoj, mi almenaŭ scias nenian.

Pro diversaj supre cititaj mizeroj la elmigrado de vilaĝanoj kreskas, kvankam la elmigrado eksterlanden estas ĝenata per diversaj militservaj leĝoj kaj aliaj malhelpaĵoj. Antaŭ milito oni elmigradis al Usono; sed nun la nombro de elmigrantoj Usonon estas limigita. Tial la elmigrantoj devas serĉi aliajn "landojn de feliĉo" (Argentino k. a.), kie ili, nesciantaj lokan lingvon, ofte trafas en pli grandan mizeron.

Jen kiel mizere vivas litovaj vilaĝanoj. Sed ni ne tro malĝoju. Litovaj urboj kaj urbetoj staras sur pli alta kultura nivelo. Tie prosperas ankaŭ socialismo. Ĉi ondo de kulturo kaj klaskonscio penetris ankaŭ en la vilaĝon. La stultaj maljunuloj restos stultaj ĝis morto. Sed la junularo leviĝas. Ĝi jam forĵetas iom post iom drinkemecon, malklerecon, superstiĉojn kaj rigidecon. Junularo organiziĝas, ribelas kontraŭ pastraj mensogoj, ekprenas libron, aperas sur scenejo. Juna generacio estas nia espero! Nur ĝi levos litovan vilaĝon sur pli altan kulturan kaj socian ŝtupon! Kamaradoj tutmondaj! Ĉu vialanda vilaĝo estas en la sama stato? Skribu, "Sennaciulo" akceptos. Multe oni skribas pri mizero de fabrikan laboristoj, sed malmulte ni scias pri vilaĝanoj, kiujn same premeblas la kapitalismo. Ni ne forgesu niajn kamaradojn vilaĝanojn!

Filo de Vilaĝano.

La "junspartakista" movado en Germanio

Okaze de la "Internacia laborist-infana semajno", kiu daŭris de 30. aŭgusto ĝis 6. septembro, ni povis konstati en Germanio atentindan kreskon de organizita revolucia infanmovado. Laŭ la modelo de "junaj pioniroj" (infanoj de Lenin) en Sovet-Unio formiĝis en Germanio grupoj lokaj de laboristaj infanoj al potenca, centrigita organizaĵo, kiu laboras man' en mano kun junularo kaj plenaĝuloj. La fundamenta ideo, ke plej frue la juna homo ekkonu, kio minacas lin en la vivo kaj kion li devas kontraŭbatali kaj alceli, kondukas al la konsekvenco: la infanoj ne estu detenataj de la politika "veneno", sed estu fruaĝe instruataj pri la bataloj, kiujn trapasi devas la plenaĝa laboristaro. Ili ekklariĝu pri la jugo, sub kiu suferas la gepatroj, kaj pri la kaŭzo de tiuj suferoj, kiuj trafas ilin mem kune kun la gepatroj.

La nomon prenis la org-aĵo de Spartako, la antikva heroa porbatalanto de liberigo el sklava jugo. Kaj ĉiu infano eniranta la org-aĵon estas instruata pri tiu historio el antikva Romo, kiu validas tra la tutaj jarcentoj (ĉiam nur en ŝanĝita formo) ĝis nuna epoko de imperialista kapitalismo. La infanoj estas edukataj tie ne nur, por lerni politikan pensadon, sed ankaŭ — agadon. Se oni memoras, kiom utilaj povis kaj povus esti infanoj dum revoluciaj agoj, tiam oni scios taksu la gravecon de tiu punkto.

Tiuj infanoj distingiĝas marŝante surstrate (ili partoprenas ĉiujn demonstraciojn de la laboristaro) per disciplino kaj ordo. Ili havas sian propran estraron el infanoj. Infanoj plenumas ĉiujn funkciojn. Eĉ ili havas siajn proprajn oratorojn, kiuj parolas antaŭ la publiko, kiam estas manifestacioj aŭ, kiel en la internacia semajno, publikaj infan-kunvenoj.

Tamen la plej grava agadkampo por la infanoj de l' organizaĵo estas la lernejo. En la lernejo ili provas ariĝi kaj altiri ĉiam novajn infanojn malkontentajn pri la metodoj de instruado kaj pri la naciisma edukado de la instruistoj al sia rondo, tiamaniere formante en favoraj okazoj verajn "lernejajn ĉelojn" kun firma programo kaj certaj taskoj solvataj. La efikoj estis sentataj de la reakciuloj. Sekvis malpermesoj de la Junspartaka Ligo en Bavario kaj en Turingio. La reakcio timas tiujn infanojn organizitajn kaj skribas pri la danĝero en sia gazetararo.

Sed la infanoj-pioniroj neniel lasas timigi sin. Kun entuziasmo, laboremo kaj konsekvenceco ili iras sian vojon, garantianta al la pli maljunaj la Novon de la Estonto!

Leipzigano

TRA LA KLASBATALO

Dum la nokto al 6. sept. en Varsovio estis arestitaj pli ol 100 komunistoj.

Abd-el-Krim faras novajn atakojn kontraŭ la hispana kaj franca frontoj, por malhelpi la kontraŭulajn preparojn por ofensivo.

La kunsido de la Ligo de Nacioj estas malfermita en Ĝenevo per Painlevé.

Protokolo

de la Va SAT-Kongreso en Wien

11.—15. aŭgusto 1925

(Fino)

Prop. XIV rekomendas akcepti la komisiono. K-do Bässler: Ni ne rajtas kateni la manojn de la k-do. Tamen mi rekomendas la akcepton.

K-do Feith: La propagando ĉe socialdemokratoj per niaj du gazetoj (unu kun komunistaj insignoj) estas tute nebla. Ne devas aperi en la gazetoj motoj kaj devizoj de komunistaj gvidantoj. Li parolas kontraŭ la flugfolio de Berlin (Muravkin) pro la tendenco, kaj kontraŭ la germanlingva presservo pro sama motivo. Li kritikas la vorton "mond-revolucio."

K-do Slezak opinias, ke la insignoj mem ne donas la karakteron al la revuo SR. K-do Feith tro akre parolis, sed F. estas bona propagandisto kaj atingis multon en kontraŭ "ida" agado. Nun la socialdemokratoj iom kom-

prenis la taskon, kunlabori ĉe niaj gazetoj. Kial ni ne faris tion pli frue? Ĉu pri la vorto "mond-revolucio" ni ne povas konsenti? Ĉu ni deziras "nacion revolucion"? Se ni socialdemokratoj nun same vigle kunlaboras, kiel komunistoj ĉiam faris ĝis nun, la venonta Kongreso ne plu okupos sin pri tiu politika temo.

K-do Richter konsentas la akcepton de la propono, sed kontraŭas la enmeton en la statuton.

K-do Drezzen principe aprobas tiun proponon, ĉar ni sincere volas starigi unuecan fronton. Ni devas laŭeble eviti problemajn temojn, sed nur paroli pri faktoj. Ni devas batali pro tio, kion ni akiris. Laboristaro ĝenerale farigis pli konservema. Ni restu klasbatalaj esperantistoj. Ni ne forlasu klasbatalan tendencon. Kiu rezistas la revoluciajn ideojn, tiu ne povas kun ni kunlabori. Grandan skismon ni devas nepre eviti. Oni ne enmetu la proponon en statuton, sed traktu kiel deziresprimon.

K-do Jonas: Sola mia propagandilo por SAT estis "Sennaciulo". Venis malbona impresio. La kom. organizaĵoj pli subtenas la movadon ol socialdemokratoj. La rusaj k-do-estis pli agemaj ol ni. Sed kelkaj artikoloj entenis "pintojn" kontraŭ aliaj tendencoj. — Per alia organiza sistemo ni povus pli bone atingi nian celon.

K-do Revo: Mi atakis k-don Sproeck, ĉar li volas disigi SAT. La vorto "mond-revolucio" ne povas esti malakceptata de socialdemokrato (ĝin uzas en siaj verkoj Bauer, Hilferding, Kautsky). Se k-do Jonas parolas pri komunista sintrudo, li pripensu, ke ekz. ankaŭ la hieraŭa Festvespero estis aranĝita en la nomo kaj per la vortoj de la socialdem. partio. Jam estas sufiĉe grava fakto, ke ni unuanime faris la plej gravajn decidojn dum tiuj kongresaj tagoj, ke ni estis samcelantoj. Ni ne kreu lasttage disharmonion.

K-do Drezzen proponas ĉesigon de la debato. K-do Deubler kontraŭas.

Voĉdonado decidis finon de la diskuto (kontraŭ 5 voĉoj).

K-do Zavada kredas plej grava tiun proponon. Li dezirus intertendenca komisiono. Parolas pri superpartia kulturo kaj la vana provo estingi la partian animon en ni. En la vicoj de SAT ni estu superpartiaj. Ni propagandu ĉion, kio estas ĝenerale sennaciisma. Tendenc-folietoj al la gazeto aldonataj ŝajnas necesaj. (K-do Richter vokas: Mankas la mono!).

K-do Lanty defendas la forstrekon de frazo el artikolo. Oni devas eviti polemikojn pri ĉiutagaj aferoj.

K-do Feith kredas la proponon de k-do Zavada praktike neefektivebla. Oni ne akceptu tro multajn art. de unu tendenco.

K-do Deubler alvokas al vera toleremo. Mi ĝoje legas artikolojn skribitajn laŭ certa mondrigardo, ĉu komunistaj, ĉu socialdemokrataj. Sed aĉajn esprimojn ne devas enhavi la artikoloj. Per la nura vorto "superpartieco" ni ne ŝanĝos la aferon.

K-dino Limouzin spertis, ke ankaŭ la komunistaj artikoloj estas cenzurataj en SAT, eĉ malakceptataj.

La propono XIV estas akceptata kiel deziresprimo (kontraŭ 1 voĉo).

Oka laborkunsido, 14. aŭgusto posttagmeze.

Daŭrigo de pritrakto de la proponoj.

Propono XV (S-ulo n-o 43) jam estas pritraktita.

Propono XVI (S-ulo n-o 44) rekomendas malakcepti la komisiono. Ĉar Sennaciulo jam havas multege da prezoj, ni ne povas riski fari du prezkategoriojn.

K-do Bauer-Gablons volas per la propono plialtigi la tarifon por la "neŭtraluloj".

K-do Lerchner: Doni al SAT-anoj favorprezon por la gazeto estas neeble. Krome ĉe semajna organo la afero estus tro komplika. La propono XVI estas unuanime malakceptata.

Propono XVII (S-ulo n-o 44) la komisiono proponas transdoni al la kooperativo. Ĝi decidu, ĉu estus oportune eldoni.

K-do Guma opinias superflue eldoni tekstlibron sen muziknotoj.

K-do Bauer opinias, ke plej multaj melodioj estas konataj. Sufiĉas, se unu k-do en grupo havas la plenan Kantaron (kun notoj).

Oni akceptas la proponon de la komisiono.

Propono XVIII jam estas pritraktita.

Propono XIX (S-ulo n-o 44) la komisiono rekomendas malakcepti, ĉar estas parolite jam multfoje pri varbado.

K-do Zavada opinias tre grava la laboron en kooperativoj. Ĝis nun oni nenion faris tiurilate. Petas akcepton.

K-do Richter opinias, ke oni povus rekomendi la proponon al la anaro.

La propono XIX estas unuanime akceptata.

Propono XX estas laŭ konsilo de la komisiono unuanime malakceptata, ĉar la akcepto signifus financan malutilon por la Asocio.

Propono XXI (S-ulo n-o 44) rekomendas malakcepti la komisiono, ĉar ni ne konas la aferon Hajdovski, do ne povas enmiksiĝi. La propono estas malakceptata (kontraŭ 2 voĉoj).

(K-do Deubler rimarkigas, ke li nur malakceptis, ĉar li ne konas la kaŭzojn de la enkarcerigo). Propono XXII jam estas pritraktita. Propono XXIII oni akceptas kun la kondiĉo, ke la iniciatintoj mem entreprenu la el-laboron de la projekto.

Propono XXIV kaj XXV jam estas pritraktitaj.

Propono XXVI la Kongreso malakceptas laŭ deziro de k-do Barthelmess, kiu diras, ke en SR. ankoraŭ okazos konkurso kun la tasko, krei definitive taŭgan SAT-himnon.

Post komencita pritrakto de la tro malfrue alvenintaj, nepresitaj en "Sennaciulo" proponoj (n-oj 27—35) la Kongreso decidis laŭ propono de k-do Deubler, ne plu pritrakti tiujn proponojn, sed transdoni al la EK. por la proksima kongreso.

K-do Drezzen deziras, ke oni akceptu deziresprimon, ke k-do-laboristoj klopodu eniri en Lingvan Komitaton por revoluciigi LK. La naciaj lab. esp. asocioj havas la taskon zorgi pri tiu punkto. La Kongreso akceptas tiun deziresprimon unuanime.

K-do Guma prelegas kiel fina ekstrakto kaj resumo de la Kongreso la

Gvidrezolucion

(kiu estas presita distinge en n-o 48 S-ulo, pĝ. 2).

Tiu gvidrezolucio estas akceptata de la Kongreso sendiskute kaj unuvoĉe.

Eventualaĵoj.

K-do Zavada rekomendas fondon de internacia laborista biblioteko ĉe SAT, kiu ampleksu ĉiujn gravajn verkojn de socialistaj aŭtoroj en ĉiuj lingvoj, el kiu la Eldona Fako povu ĉerpi materialon por siaj eldonaĵoj kaj el kiuj povu ĉerpi ĉiujn studemuloj kaj tradukemuloj de tiuj verkoj.

K-do Deubler opinias, ke la malgranda aparato de SAT ne elportos tiun ŝarĝon kaj ne kapablos plenumi tiun taskon.

K-do Guma same pridubas la praktikeblecon de tiu projekto kaj eĉ la utiligeblecon. La propono estas malakceptita kontraŭ la proponinto.

K-do Ĉeh-Wien atentigas pri la proletaria Turista Asocio "La Naturamikoj". Li proponas, ke la SAT-anaro penu interesigi la anojn de la intern. tur. asocio "La Naturamikoj" pri la problemoj de intern. lingvo Esperanto, por enpenetriĝi ĝin en ĉi tiu nova, grava socialisma movado.

La propono estas unuanime akceptata.

K-do Richter atentigas pri subteno financa de respondecaj personoj, kiuj nepre devas ĉeesti la Kongreson. Ke ili sendu skribitajn raportojn, ne sufiĉas, ĉar ili devas en la diskuto ĉeesti, por respondi al la demandoj. Li postulas, ke oni donu rekompencan financan al almenaŭ kelkaj k-do.

K-do *Deubler*, *Feith* kaj *Ĉeh* donas tiurilatajn konsilojn.

K-do *Klopffleisch* deziras, ke la raportoj al la Kongreso aperu presite antaŭ la Kongreso. La Kongreso unuanime konsentas rekompencan de kostoj porkongresaj al tri k-do (inter ili estu minimume unu EK-ano).

K-do *Lerchner* opinias, ke oni skribe ne tiom larĝe povas pritrakti kongresraporton, kiel estas eble buŝe. K-do *Drezen*: Oficialan raporton trankvile oni antaŭe povas presigi, kvankam en konciza formo.

La Kongreso donas sian konsenton al tiu opinio.

K-dino *Noël-Paris* en la nomo de la EK sciigas la Kongreson, ke la malnova EK disigis, ke k-do *Migny* ne konsentis denove akcepti la oficon de EK-ano, ke ankaŭ k-do *Lanty* antaŭ kelka tempo ekzigis el la EK. (ŝi legas la leteron de *Lanty* al EK. per kiu li deklaras sian ekzigon, pro sekvoj de malsaneco kaj operacio). Ke tamen la EK ofte turnis sin al k-do *Lanty*, bezonante lian konsilon, kaj tial treege deziras, ke k-do *Lanty* oficiale reprenu oficon en EK. Ŝi petas la Kongreson, per vorto instigi k-don *Lanty* denove eniri EK-on. K-do *Zavada* kaj *Drezen* subtenas k-dinon *Noël*.

La Kongreso per aplaŭdo esprimas sian aprobon.

K-do *Deubler* parolas pri rifuzita artikolo de k-do *Sproeck*. K-do *Barthelmess* klarigas, ke ĝi alvenis tro malfrue, krome entenas ofendojn personajn kontraŭ k-do *Lanty*.

K-do *Narmi* propagandas hungarlingvan lab. kultur-gazeton kun parte esperanta enhavo, agitas por la ideo de kulturgazeto, en kiu partoprenas ĉiuj prol. kulturmovadoj.

K-do *Guma* parolas pri kulturo kaj "ne-bezonaj bezonoj". Ni faru la revolucion en la spirito. K-do *Zavada* parolas pri manko en la Kontrolkomitato. K-do *Lehmann-Dresden* parolas pri propagando ĉe la Ligo de la Militkontraŭuloj (Berlin). Pri stato de SAT en Dresden.

Post pritrakto de kelkaj teknikaj demandoj rilate al kongresbildo, kongresprotokolo, komisionoj elektitaj, kolportado de S-ulo k. a. k-do *Slezak* konstatas, komparante la Kongreson kun la burĝa, kiu okazis lastjare en Wien, ke la laborkunsidoj de la burĝa kongreso ne estis pli bone vizititaj ol tiuj de nia Kongreso, kvankam lastjare miloj ĉeestis. Tial la V. SAT-Kongreso fariĝis sukcesplena kongreso.

K-do *Drezen* (finparole): En la nomo de la Prezida Komitato mi havas la plezuron konstati, ke la Kongreso estis ekstreme sukcesplena, ke ĝi evitis grandajn skandalojn, ke tio signifas grandan progreson de nia movado. Li dankas al DK kaj EK kaj Loka Kongreskomitato, kiu permesis nin kunveni kaj konvene kaj dece labori. Ĉiuj k-do devas konstati, ke en nia anaro regas unueco. Ke ekzistis unueco lingva, tio ne estas miriga. Sed nur unu propono koncernis la lingvan aferon. Ni estis unuanimaj en politikaj demandoj. En praktika apliko de esp-o por revoluciaj, por klasaj celoj. Bona espero en la estontecon! Espereble ni povos saluti vin en plej proksima jaro en Soveta Respubliko, por ke vi konatigu kun malbono kaj bono de nia lando!

Kun kantado de la unua strofo de "Internacio" la Kongreso fermiĝas.

Alvoko
al tutmondaj kamaradoj
farita je 30. julio 1925 per raditelefono
de "Kom. Intern." en Moskvo
de N. P. *Evstiféieff*.

Karaj kamaradoj, interlimaj kaj eksterlimaj!

La vivo ne estas ludo, ĝi estas batalo. Tial ĉiuj demandoj, kiuj staras antaŭ ni, devas esti solvataj ne de luda vidpunkto, sed de batala vidpunkto. De l' sama vidpunkto ni prijuĝas nun eĉ demandojn pri sporto, kiu ĝis nun ŝajnis al multaj nur

sistemo de ludoj organizitaj, nur kvazaŭ unu sistema personara amuzo. Nun, ĉe ni, en nia laborŝtato ni konsideras eĉ la sporton ne kiel ludon, ne kiel amuzadon, ne kiel "agrablan" manieron pasigi la tempon, nin distri, nin konkurence kompari unu kun la alia por vana gloramo, por personeca ambiciero, sen ia ajn utilo por la laboristaro, por nia laborŝtato, sed kontraŭe — ni konsideras la sporton kiel "utilan" manieron laŭcele nin plisaniĝi, nin plifortigi, nin plilertigi, ni konsideras la sporton — unuvorte — kiel fizikan kulturon utilan por ni kiel por laborantoj kaj batalantoj. Ni ja bezonas sanon, forton kaj lertecon korpan kaj nervan por du ĉefaj celoj, unue por kiel eble plej fruktoporte labori, due por kiel eble plej sukcese kaj energie nin defendi en la okazo de atako, de neceso ne nur kontraŭ malamikoj (homoj), sed ankaŭ kontraŭ senkompata naturo.

Du ĉefajn bezonojn ni posedas, kiujn ni ne rajtas, eĉ se ni povus, kiujn ni ne povos, eĉ se ni dezirus, forlasi eĉ dum unu momento, tio estas la bezonoj sin nutri (ni ja grandskale spertis malsaton al ni antaŭ nelonge kaŭzitan de niaj "kulturaj" najbarŝtatoj!) por progresi kaj nin defendi, por memstare ekzisti — biologie kaj ankaŭ sociologie.

Jen de kia vidpunkto ni nun konscie kaj kutime (ĉar nia hodiaŭa "kutimo" estas nia hieraŭa "konscia" decido kaj penlabora fortstrebado) alpaŝas al ĉiuspeca demando.

Ĝuste tiel same ni, sovetlandaj esperantistoj, alpaŝas ankaŭ al la lingva problemo, kaj tion ni esprimas interalie en nia poezio.

Ĝis nun la internaciaj rilatoj estis la plej grava privilegio de potenculoj kaj de riĉuloj. Ĝis nun nur ili povis permesi al si la lukson vidi kaj aŭdi kaj scii ion pli malproksiman ol ĉirkaŭaĵojn de sia propra malalta mizera "preĝeja sonorilejo", ĉar ili (kaj nur ili!) posedis por tio ĉiujn necesajn rimedojn kaj ilojn.

Nun ni, rusaj proletarioj, fine akiris flugilojn, per kiuj ni povas flugi malgraŭ kaj trans ĉiuj landlimoj en Mongolan, Ĥinan aŭ Japanan landon. Ni, rusaj proletarioj, akiris orelojn, per kiuj ni povas aŭskulti sonojn de lingvoj de ĉiuj aliaj nacioj ne sole unuigitaj kun ni politike, sed ankaŭ de la nacioj, kiuj estas ankoraŭ perforte fortentataj ekster nia Soveta Socialista Respubliko, ĉar ni, rusaj proletarioj jam ekposedis radiantenojn (artepliperfektitajn laŭ fabela skalo—"orelojn"). Ni, rusaj proletarioj, volonte respondus aŭ kelkfoje kontraŭdirus, volonte interparolus kun niaj samklasanoj, sendepende de politikaj kaj de landaj limoj, ĉar ni nun sentas kiel nia "lango" ankaŭ pliperfektiga, maturiga, ni jam povas ne sole paroli, sed eĉ laŭparoli per niaj laŭparoliloj, per niaj plilaŭtiloj... Tamen samtempe ni duoble, multoble pli forte sentas, ke, se landlimoj fakte malaperas, se distancoj, interspacoj elvaporiga, restas grandega, fatala, ankoraŭ ne superita, ne venkita baro — *diverslingveco!*

Jen kio nun ekstaras antaŭ ni, rusaj proletarioj, kiel "laŭvica" baro, malhelpanta nian celadon al frata unuiĝo kun tutmonda proletario!

Manko de unu komuna helpa lingvo malhelpas nun nian milit-iradon al la efektivigo de nia komuna celo, kiu estis proklamita kaj sekve konscie komencita jam antaŭ preskaŭ okdek jaroj per la alvoko: "*Proletarioj de l' tutmondo, unuiĝu!*"

Ni iom ŝanĝas la alvokon, ĉar ni jam nun ne atentigas diverslandecon tiel same, kiel ni jam ne kantas plu pri nia "estonta" batalo (Tio "estos" nia lasta batalo), sed ni jam kantas pri nia "estanta" batalo (Tio "estas" nia lasta batalo).

Do — ĉu ni ne venkos en decida horo? Sendube, ni venkos ankaŭ ĝin, tiun lastan baron, kiel ni jam venkis multajn aliajn antaŭajn per fabela streĉo de niaj proletariaj fortoj kaj fervoro!...

Ni meritis sukceson kaj atingis ĝin!

Forte staras muroj de miljaroj

Inter la POPOLOJ dividitaj

Sed DISFALOS la obstinaj baroj

Per LABORA KLASO disbatitaj!

Jes, ni ilin disbatos batante, batalante, frapante kaj ili disfalos, ĉar eĉ guto malgranda konstante frapante traboras la monton granitan!... Ĉu do la konscia organizata klaso de l' veraj kreantoj de ĉio, kion posedas la homaro, ne povos, ne kapablos per solidaraĵoj, konsciaj, persistaj fortstrebadoj atingi ĉian sukceson? Despli facile ni traboros la klason kontraŭstarantan, kiu similas pli multe ne "monton granitan", sed lignon putrintan aŭ "koloson" argilan, similan al nia antaŭa carujo!

Kaj ni ja ĵuris labori kaj ĵuris batali por re-unuigi l' homaron!

Kion do ni bezonas por tio? Unue, forigi la potencon, la estrecon de tiu klaso, kiu preferas disecon sub plej diversspecaj pretekstoj: religio, historio, nacio, lingvo, kultura nivelo kaj tipo, raso, "naturaj" limoj ktp. Tion ni faras kiel "revoluciuloj"! Due, enkonduki ilon, sen kiu neniu homo povas home, hominde unuiĝi kun alia homo; tio estas ek-uzi komunan lingvon tiel same, kiel ni jam uzas telefonon, telegrafon, aviadon, radioparoladon, mikrofonon, laŭtigilon ktp. Tion ni faros kiel "esperantistoj"!

Ĉu eble ni bezonas halti post niaj teknikaj sukcesoj kaj aranĝoj antaŭ la lasta problemo, la problemo de l' lingvo? Ne, tion ni ankaŭ ne prokrastos ĝis la venonta tempo eĉ dum unu tagnokto, ĉar tio estas nur logika ĉenero, logika paŝo en nia ĝisnuna sukceshava, gloriplena, venkriĉa militmarŝo!

Kaj nur tiam por eterna ben' de l' homaro efektiviĝos ke la neekspluatataj (kaj samtempe plu ne ekspluatataj!) amasoj da homoj, komprenante unu la alian kreos unu grandan rondon familian, similan al la familio de niaj popoloj unuiĝintaj en nia Soveta Socialista Respubliko.

Jen, KIAL nia diligenta kolegaro en labor' necesa ne laciĝos!

Jen, KIAM la bela sonĝo de l' homaro por eterna ben' efektiviĝos!

Ĉar ne al glavo sangon soifanta ni la homan vokas familion, sed — kontraŭe — al la mond' eterne militinta ni promesas veran harmonion!

Mi diras "ni", ĉar ĉio estas farata de homoj kaj por homoj laŭ iliaj bezonoj, interesoj, vivplanoj, laborideoj!

Nur "nenio" estas farata de "Nulo", nomata "Dio", kaj "per si mem" aŭ per nekapteblaj, nekonataj fortoj ("tempo", "progreso", "vivo" ktp.).

Kaj tial ni, aŭdante la ĝemojn de hinda laboristaro kaj junularo, aŭdante la kriojn de ribeliĝintaj riflandanoj en Maroko, aŭdante la sopirojn de bulgaroj sufokataj, ni scias, jes, ni scias, ke tio finiĝos kune kun la fino de burĝa mondestreco, finiĝos kune kun la venko de laborista mondevolucio!

Ni scias tion, ĉar ni konas nian volon kaj vian volon, la volon de l' plimulto de l' homaro, — klera kaj malklera, kultura aŭ nekultura, jam organizita kaj ankoraŭ ne organizita, jam vekita aŭ ankoraŭ dormanta, blanka kaj nigra aŭ meza! . . .

Do, ne timu ĝin, la Revolucio, eĉ la plej timemaj, ĉar ĝi portas la savon al homaro!

Tempoj, rapide pasantaj, laŭ leĝoj de vivo kaj historio necesaj (ĉar reeviteblaj!) suferoj kaj doloroj de l' Revolucio, kiel de l' traŭma periodo, estas tiel same savigaj kaj sanaj kiel la suferoj de naskanta virino, kiu donas vivon al la nova vivonta estrarano de nia terĝlobo! . . .

Sed por tio en la decida hor' nenion prokrastu, neniun atendu, ĉar neniun vin savos, neniun vin helpos, nek dio, nek caro aŭ alia landreĝo, nek ia heroo . . .

Liberon donos al popolo nur ĝia propra forta man'!

Tial "plifortigu" ĝin per ĉio, per kio vi povas kaj bezonas: se per la lingvo, kiel per laŭvice bezonata ilo, tiam ankaŭ per lingvo!

Tial "unuigu" viajn labormanojn per ĉio, per kio vi povas kaj bezonas ilin kundirekti: se via propra (persona aŭ nacia) lingvo ne sufiĉas en la tutmonda batalo, se vi bezonas helpojn de internacia ligilo, tiam ankaŭ per helpanta lingvo internacia!

Jen kion diras al ni nia esperanta poezio!

Al kio do ni alvokas vin fine? Al pac-labora ("ne pacifista") sed amasa sistema ĉiutaga praktika uzado de la Internacia Proletaria Helpa Lingvo Esperanto, kreita kaj persekutita en la mortaĉinta estinta Rusa Imperio, vivanta kaj uzata en la nuna ekfloranta Sovetrespubliko!

Vivu do la tutmonda batalanta kaj laboranta proletario!

Sukcesu la tutmonda interproletaria ligilo — Lingvo Internacia Esperanto!

Prosperu la tutmonda laborista unuigo — Internaciano!

Venku jam alveninta kaj daŭrata spilitime — *Proletaria Revolucio!*

Forte staru ĝia unua venklando — nia Soveta Respubliko!

Venu la Savonto de l' Homaro — Tutmonda Soveta Respubliko!

Ne estingu la memoro pri niaj gvidintoj — Kamarado Lenin kaj Doktoro Esperanto!

Pereu imperialismo, ĝin naskinta kapitalismo kaj ĝin servanta militarismo!

(La aŭtoro dediĉas la ĉi-supran alvokon al la V. Kongreso de SAT.)

Esperanto kaj profunuigoj

Se antaŭ kelkaj jaroj, la demando pri transporto de fundamenta bazo de laboro por Esperanto en profunuigojn, en laboristamasojn, por kelkiuj el esperantistoj sonis ankoraŭ iomete strange, do nuntempe, ŝajnus, en tiu ĉi demando devas esti neniuj disputoj. Tamen la praktiko montras kontraŭon: ĝis nuna tempo tiudirekte oni ne havas klare difinitan linion. Ĝis nuna tempo la laboro estas farata senbazite, la esperantistoj plejmulte organiziĝas, unuigas, registriĝas kaj nombriĝas ekster tempo kaj spaco, laŭ tipo de "amatoraj" unuigoj kaj en certa grado ili apogas sin en la laboro ne sur la laboristajn amasojn kaj iliajn organizaciojn, sed sur tiel nomatajn "liberajn" profesiojn, forŝiritajn de vivaj agfortoj de l' historio. Dank al tio esperanta movado ne havas tiujn rezultojn kaj sukcesojn, kiujn ĝi rajtus nuntempe pretendi kaj esperi.

Ne tuŝante la detalojn de l' historio de okazinta situo, estas necese atenti tiun ĉi cirkonstancon, kiel de l' apartaj esperantistoj, legantaj, same kaj ĉefe, de la gvidantoj de esperanta movado ĝenerale kaj precipe laborista.

Do, vere, sur kiun alian esperantistoj, kaj ĝenerale iu ajn movado, povas sin apogi, por certe scii, certe difini, trovi firman apogon kaj plifirmigi siajn sukcesojn, krom sur laboristaj amasaj profunuigaj organizacioj kaj partio? . . . Oni ne havas en la mondo iujn ajn aliajn agfortojn de l' historio, krom laboristaj organizacioj, vivaj, plensangaj, fortaj, donantaj vivplenajn branĉojn de l' estonteco kaj firme komencantaj preni la estantecon, sur kiuj oni povas sin apogi en tiu ĉi laboro — sed interalie, ĝis nuna tempo tiu ĉi forto plej malmulte estis aplikata.

La estonteco, kiel en revolucia lando SSSR, tiel same en la tuta mondo apartenas al laborista klaso, en tiu direkto ne povas ekzisti du opinioj, kaj do Esperanto devas esti ilo ekskluzive por laborista klaso. Per tiu ĉi armilo ni esperantistoj devas ĝin (laboristan klason) armigi kaj neniun pli, en tio estas la fundamenta senco de tuta nia laboro, de tuta elspezo de nia energio. El tio ni estas devigataj fari konsekvencajn konkludojn, kiam ni decidis la demandojn de nia ĉiutaga laboro dum niaj revoluciaj kongresoj.

Estas tute klare, ke "ĝis tiu tempo, ĝis kiu ne estos alilititaj profunuigoj, paroli pri adopto de Esperanto ni havas neniujn motivojn, alilitinte la profunuigojn, ni estos nevenkeblaj". Tio estas ne nova vero, sed bedaŭrinde, en ĉi tiu direkto estas farite treege malmulte kaj al tiu punkto ni devas aliri plej proksime.

Tutan laboron, kiu estos farata ĉe la lokoj, necesas konstrui sur la bazo de amasaj laborist-organizacioj, t. e. per iliaj laboristaj komitatoj, laboristaj kluboj, ĉefrajtigitoj de l' sindikatoj ĉe la fabrikoj, uzinoj kaj metiejoj. Unuvorte, la laboron oni devas dividi laŭ linio de apartaj produktoj, profesiaj unuigoj, ne rifuzante samtempe de la lokaj ĝeneralaj esperantaj unuigoj gvidantaj la laboron de certa urbo aŭ vilaĝo. Tion necesas fari por ke en ĉiu unuigo estu kreitaj bonaj "fermentaj" emociigantaj ĉeloj, kiuj en la procedo de sia disvolvo influas kaj premus superajn partojn de l' profunuigo kiel rilate la gvidadon de esperanta movado laŭ profesilinio, tiel same rilate ĝian aplikon por eksterlandaj interrilatoj. Se tiun ĉi paŝon ni ne faros, tiam ni glaciigos pluajn disvolvonojn de Esperanto ankoraŭ por kelkaj jaroj, ĉar flanke, apartiĝinte de laborista amaso kaj ĝiaj unuigoj, kiom ajn ni klopodus aŭ agitus — la utilon ni havas nulan, ni nur vane perdus nian energion. En nia afero, kiel en iu ajn alia, ni devas lerni organizaci-spertojn kaj metodojn de komunistaj partio — la partio tiudirekte ĉiam metis kaj metas plenguste, — solvon kaj efektivigon de ĉiuj demandoj per amasoj kaj iliaj organizacioj.

Eble oni faros la demandon: "Kial necesas tiun ĉi laboron komenci de malsupro?" Do nur tial, ĉar tio estas pli bona kaj certa vojo. El la sperto de esperanta movado oni povas diri, ke kiam oni komencis labori nur inter la influa parto — ĝi preskaŭ ĉiam ne plifirmiĝadis, sed disfaldis kaj nur tiu movado estadas firma kaj fortika, kiu sin apogas sur amasoj.

Tial la laboron inter profunuigoj oni devas komenci ne de supro, sed de malsupro, de la mem amasoj kaj inter la amasoj. Alilitinte la amason, enmetinte tie la fundamenton, nin povos timigi neniuj apartaj opinioj, la movado plue marŝos antaŭen kaj trovos tiun vojon, kiun esperantistoj vane serĉas jam dum kelkaj jaroj kaj ne trovas nur tial, ĉar ankoraŭ ne estas metita sufiĉe klara kaj difinita linio en tiu ĉi direkto.

Oni povas esti certa, ke tiun ĉi linion revoluciaj esperantistoj trovos kaj ke ili ne nur ĝin trovos, sed ankaŭ bonege ĝin difinos kaj montros pluajn ĝian disvolviĝon.

Tiun ĉi linion estas necese trovi, kvankam tial eĉ, ke fakte la vivo mem ĝin montras — ekzistado de laboristaj internacioj, kreo de Komintern kaj Profintern, kaj ankaŭ starigo de l' demando pri profesia unueco en la tutmonda movado, kunproksimiĝo inter anglaj kaj profunuigoj de S.S.S.R. kaj la vojaĝoj de niaj laboristaj unuigoj eksterlanden — ĉi ĉio parolas pri difinita direkto en la solvo de tiu ĉi demando. Nuntempe aplikata interŝanĝo per leteroj inter laboristoj de fabrikoj kaj uzinoj kun laboristoj de diversaj landoj, nur pravigas tiun ĉi penson. Fine plifirmiĝo kaj disvolviĝo de poŝt-telegraf-telefona kaj avio-kunligo aldonas la pruvon, kaj disvolvo de radio-telefonio

jam postulas de laboristaro meti la demandon pri internacia lingvo.

Tiun ĉi demandon laboristoj devas solvi ĉe la plej proksima tempo, — de esperantistoj, ne "revuloj", sed praktikuloj, dependos la solvo de metita demando kaj apliko de esperanto kaj ĝia rolo. Oni povas diri, ke neniu alia laboro estos pli fruktodona, kiel supremetita. Por tiu ĉi laboro — por la laboro inter laboristaj amasoj, iliaj malsupraj organizacioj — la esperantistoj devas nek ŝpari la rimedojn, nek fortojn. Almilite de laboristamasoj plene asekuros la sukceson de esperanto kaj same ĝian disvolvon kaj adopton, kiel en apartaj landoj, tiel en la tutmonda skalo. Ne ekzistas pli potenca, pli longdaŭra kaj firma, ol liberiganta de la katenoj laborista klaso kaj tial antaŭ esperantistoj, se oni ne volas trafi la fikorbon de l' historio sed esperantistoj revoluciuloj ne povas tion voli — povas esti sola vojo, kaj tiu ĉi vojo estas marŝi ritme kun la tuta laborista klaso — por ĝi kaj kun ĝi. En tiu ĉi direkto do devas esti konstruita tuta nia estanta kaj estonta laboro.

Esperanto inter laboristoj, esperanto por laboristoj — jen ĉefa tasko kaj devizo de la tago en la proksima kaj estonta nia laboro.

Do vivu laboristigita esperanto!

N. Modenov (SAT-n-o 4834).

P.S. De l' aŭtoro. La gazetoj transpresontaj tiun ĉi artikolon bonvolu sendi po unu numero laŭ adreso Rusio Moskva Potapovskij per 12 kv. 5.

Pri rekta metodo

Tiu ĉi artikolo estas precipe destinita por k-doĵ kiujn ne atingas la nacilingvaj esp. gazetoj ĉar en tiuj, almenaŭ en „Germ. Lab. Esperantisto“ oni jam pritraktis ĉi-temon. Estas nepre necese, ke la k-doĵ en landoj kie ne ekzistas organizita lab. esp. movado, ili streĉu la fortojn por ke ankaŭ en tiuj landoj nia esp. kaj SAT-movado ricevu firman fundamenton.

Kamaradoj, la aŭtuno komenciĝas, kaj kun ĝi ankaŭ la propagand-sezono de la esperantistoj. En multaj grupoj oni nun vigle diskutas la aplikotan metodon instruan. Tute prave la plej viglaj k-doĵ preferas la rektan metodon (pli ĝuste la parolan metodon). Certe tiuj k-doĵ scias, kial ili preferas la parolan metodon anstataŭ la gramatikan. Ni ĉiuj deziras, ke ni kiel eble plej baldaŭ eduku esperante parolantajn k-doĵn, kaj tiujn ni nur povas havigi al ni per parola metodo. Ofte ni spertis, ke k-doĵ kiuj estis finintaj la komencantan kurson, povis bone skribi, legi kaj kompreni esp. sed bedaŭrinde ili ne povis paroli iun ajn frazon. Tio estas tute komprenebla ĉar tiuj k-doĵ ne lernis la lingvon, sed nur la gramatikon. Ekz. ni scias, ke en lernejoj oni instruas al lernantoj div. naciajn lingvojn dum daŭro de 3-4-5 jaroj, sed multe paroli la koncernan lingvon ili ne povas, mi spertis tion dum la milito ĉar la praktikadon de la lingvo oni ne atentis. Sekve se ni

aplikas la parolan metodon, ni povas esti certaj pri nia sukceso.

Estas fakto, ke ne ĉiuj k-doĵ estas kapablaj instrui, ĉu laŭ parola ĉu laŭ gramatika metodo. Mi konas esperantistojn kiuj estas sufiĉe perfektaj, scias tre bone paroli la lingvon, sed por instrui ili ne taŭgas. Kial ne? Nu, tio ne estas ilia kulpo, sed al ili mankas la pedagogia kapableco, kaj tiun econ ni ne povas inokuli al niaj k-doĵ, same ne la oratoran talenton. Sekve ni ne prenu tiujn k-doĵn por instrui komeĉantojn. Tamen tiuj k-doĵ estas utilaj por aliaj oficoj en la grupo. Por instrui laŭ *parola metodo* ni prenu la plej bonajn kaj elokventajn k-doĵn ĉar tiuj k-doĵ devas esti la lernolibro mem. Kompreneble en grupoj kie ne ekzistas tiaj fortoj oni jam devas apliki la gramatikan metodon.

Kiel instrui laŭ parola metodo? Kiun lernolibron ni uzu? Cetere bona instruanto absolute ne bezonus lernolibron, se ni ĉiutage estus kunaj kun niaj lernantoj. Sed ĝenerale ni nur povas aranĝi nian kunvenon po semajne unufoje kaj pro tio estas necese, ke la instruanto havu gvidilon en la mano kiu pli faciligas al li la laboron, kaj aliflanke la lernantoj havas ion en la mano dum la tempo kiam ili ne kunvenas. Por tiu celo SAT eldonis kursan lernolibron kiu povas esti uzata en la tuta mondo. En ĝi ankaŭ troviĝas la div. direktivoj por la instruantoj. Kompreneble certan planon oni ne povas dikti al la instruantoj, kiam oni aplikas la parolan metodon. La instrumano evidentiĝas el la situacio. "Petro" estas facilstile verkita kaj adaptita al niaj bezonoj kaj celoj.

Kiel mi uzu "Petron"? Ekz. dum la unuaj 2 aŭ 3 vesperoj ni ne povas instrui laŭ "Petro", ĉar niaj laborkolegoj ja eĉ ne scias iun ajn vorteton pri esp. Do dum la unuaj vesperoj mi devas parkere instrui. La unuan vesperon, mi ĝenerale klarigus la lingvon esperanto, kompreneble nacilingve, lernigas la div. salutojn kaj ĉiutagajn frazetojn. La duan vesperon, mi instruas la plej simplajn frazojn prenante la objektojn el la plej proksima ĉirkaŭaĵo, ĉiam parolante esp. kun la lernantoj. Dum la kunmeto de la frazoj ĉiam palpu la objektojn kaj per gestoj kaj grimacoj ni pli komprenigu la sencon de la frazoj. Per tio la kursanoj pli bone konservas la diritaĵon en la cerbo. Ni formu la frazojn tiel, ke la lernantoj estas devigataj respondi esperante. La trian vesperon, mi procedus same kaj legigus la unuan lecionon en "Petro". La kvaran vesperon, mi prenas "Petron" kaj prilaboras la unuan lecionon de ĝi. De tiu tempo, mi ankaŭ skribigus la kursanojn, ĉar estas science konstatite kiam buŝo, oreloj, okuloj kaj mano samtempe laboras, des pli bone la cerbo konservas la materion. Dum via tuta instruado nur parolu esp. malrapide kaj klare, tamen la klarigojn vi donu nacilingve, kaj se ni intense, ne supraĵe instruas, ni ankaŭ rikoltos la fruktojn de nia laboro.

KRONIKO

Aŭstralio

Sydney. La Esperanta Klubo ĉi tie enhavas kelkajn laboristojn kaj marksistajn studentojn, kiuj klare komprenas la klasbatalon, sed ilia nombro ne estas ankoraŭ sufiĉa por formi nian propran lab. esp-o grupon. En Melburno la esp. movado estas pli vigla ol ĉi tie. De tempo al tempo burĝaj turistoj veturas al esp-aj kunvenoj en Eŭropo, sed ne estas eble, ke laboristoj faru tiel longan veturon. Ni nun propagandas esp-on per radiotelefono, kaj la movado kreskas malgraŭ la malhelpanta fakto, ke en ĉiuj partoj de tiu ĉi malmulte homhavana kontinento nur unu nacia lingvo estas parolata, kaj tiu (angla) la plej "internacia" el ĉiuj naciaj lingvoj. Nur la radiotelefonado povos disfaliĝi nian izolecon. Ĉe la Halo de Metiistaj Unuiĝoj (*Trades Hall*) la Laborista Direktoraro (*Labor Council*) proponas konstrui fortan senfadenan telegrafan stacion sub la propra estrado de lab. unuiĝoj mem. Ĝi estos unu el la plej fortaj stacioj en la mondo kaj povos dissendi rekte al iu urbo en Eŭropo aŭ alia parto de la terglobo.

Francio

Paris. 2. aŭgusto okazis granda demonstracio proletara en Clichy, apud Paris, kontraŭ la milito ĉe Maroko; ĉeestis 60 000 pers. — Speciale permesita, la Laborista Federacio Esperantista aranĝis ekspozicion de gaz. kaj verkoj pri, por kaj en esperanto; vendiĝis 475 ekz. de "unuagrada lernolibro" kaj k.k. SAT-eldonaĵoj. Pli ol 150 pers. petis informojn pri la perletera kurso aŭ pri la movado. Bonega rezulto. La grupoj aŭ kamaradoj en franc-lingvaj regionoj imitu tiun propagandon; ili rilatu kun la sekretario de "Fédération Esperantiste Ouvrière", 177 rue de Bagnolet, Paris XX. Glodeau (50)

Germanio

Chemnitz. Ĉi tie okazis dum la unua semajno de aŭg. Radio Ekspozicio de la Laborista Radio-Klubo, ĉe kiu per helpo de tutmondaj esp-istoj ankaŭ nia lingvo tre bone sukcesis. La du antaŭaj ĉambroj estas okupitaj de la industriaro, kiu prezentas la novaĵojn de la radio-tekniko. Sed precipe interesa estas la tria ĉambrego. Enirante ni ekvidas inter du kolonoj verdan tukon kun la vortoj: "Radio-Esperanto". Ni vidas ĉi tie pli ol 60 memkonstruitajn aparatojn de la plej simplaj riceviloj ĝis la plej modernaj oklampaj superheterodinaparatoj. La tuta malantaŭa parto de la ĉefa ĉambrego servas al la oficiala helpilo de Radio, al Esperanto. La mezon de la muro kovras granda murkarto, 5 metrojn larĝa, en kiu estas enskribitaj la disvastigo de esp-o per steloj kaj la nombroj de la sendstacioj de ĉiuj landoj. Multaj afiŝoj kaj statistikoj pruvas la valoron de esp-o por radio, krome la amaso da Radio-gazetoj, kiuj enhavas esp. artikolojn. En la mezo staras la klubricevilo de la Lab. Esp. Grupo Chemnitz kun siaj tri laŭparoliloj. — La ekspozicio nun estas finita. Bedaŭrinde neniu k-doĵ respondis al la alvoko en *S-ulo n-o 36*. Sendu sciigojn pri radiomovado en via lando al la Esp-Sekcio de Lab. Radioklubo en Chemnitz, k-do K. Lösch, Annabergerstr. 110.

Rumanio

La 2. aŭgusto finis kurson gviditan de K-do R. 9 gek-doĵ, kaj okaze de ĝi oni faris publikan ekzamenadon kunigitan kun programo kaj malgranda propaganda ekspozicio. En la programo estis: "La Espero", "Tagiĝo", kelkaj popolkantoj en esp-o de l' loka esp-a horo, du deklamoj: "La vojo" kaj "La frenezulo" de Petöfi kaj propagandparoloj rumane kaj hungare. Estis vigla intereso kaj oni plenis la ĉambregon. — Notinde estas, ke la plejmulto de l' publiko konsistis el gelaboristoj. Ĉiuj lokaj gazetoj favore raportis pri l' ekzameno. —

Skrībemulo.

Sovet-Unio

Ivanovo-Voznesensk. En aŭgusto Sovetl. Manĉestron vizitis angla teksisto k-do Witham

Rolo.

el Burnley apud Manĉester. Dum du semajnoj li vizitis vicon da teksfabrikoj, fabrikuirejon, konstruatan laborist-domaron. Li faris esp. paroladon pri siaj impresoj de la vojaĝo kaj observado, konstatis multe da atingajoj de la nova soci-orĉo. La kunvenon ĉeestis pli ol 300 pers., precipe tekstistoj. Nia laboristaro denove konvinkigis pri la utileco de esperanto. N. S. (3721)

Minsk. Minskon vizitis angla k-do Witham dum aŭg. K-doj niaurbaj montris al li la vidindaĵojn kaj interparolis kun unu el malnovaj membroj de Kolegio de Pop. komisariaro de Edukado. Poste la angla k-do vizitis urbeton Kojdanov kaj kelkajn vilaĝojn. Gazetoj enpresis pri tio artikolojn.

Tver. La esperantistoj de la urbo Tver jam delonge sciis pri la venonta ekskurso de svedaj laboristoj en Sovetrusion. Unu el la partoprenantoj de la ekskurso k-do Nilson korespondadas kun k-do Belov, membro de la Tvera esp. organizaĵo.

La 20. de julio de la k-do Nilson el Leningrad estis ricevita telegramo pri lia traveturo kun liaj kamaradoj preter Tver en Moskvon.

Malgraŭ la Gubkom. de S. E. U. tre malfrue ricevis la telegramon, tamen ĝi sukcesis inviti parton da esperantistoj por saluti eksterlandan kamaradon.

Je la sesa matene sur la perono de la stacidomo kolektiĝis pli ol dudeko da Tveraj esperantistoj. La vagonaro kun la svedoj alvenis je la naŭa.

En la nomo de Tveraj esp-istoj la delegacion salutis k-do Lebedev, kiu en sia mallonga salut-parolado diris, ke la Sovetaj esp-istoj utiligas la internacian lingvon Esperanto por la servoj de la tutmonda proletaro kaj por disvastigi la ideojn de

k-do Lenin. Tre kortuŝita k-do Nilson el-kore dankis Tverajn esp-istojn. Post la reciprokaj salutoj komenciĝis konatiĝo, koraj manpremoj, rapidaj demandoj kaj respondoj, ĉar la vagonaro staras nur 10 minutojn. Alvenas ankoraŭ kelkaj svedaj esp-istoj. Nin ĉirkaŭas eĉ svedoj ne-esp-istoj. Salut-krioj. Komuna entuziasmo. La bildo estis ne priskribebla. Konklude Tveraj esp-istoj prezentas al k-do Nilson la portreton de k-do Lenin kaj du bukedojn da floroj. Fine ni rapide fotografiĝas. Fajfo, kaj la vagonaro forveturas Moskvon kun komunaj krioj de entuziasmo. Tveraj esp-istoj havis la unuan okazon persone saluti kaj interparoli kun eksterlandaj kamaradoj, kaj ili mem spertis la gravecon kaj grandan signifon de la internacia lingvo esperanto por la tutmonda proletaro. A. N. Lebedev.

RECENZETO

Gazetoj.

Repris el S-ulo: *Berg-Echo*, Breslau, 19. 8., Alvoko el Ŝanhajo (S. 41).

Repris el SR: *Kultura*, Kaunas, 5/6, Sekso-signoj ktp. (febr.), 4, Ternoj de venonta milito (aŭg. 24).

Enpresis div. art. kaj notojn: *Sozialdemokrat*, Praha, 26. 8. kaj *Sächs. Arbeiter-Zeitung*, Leipzig, 20. 8. pri V. Kongreso de SAT, *Heroldo de Esp.*, presigis en n-o. 66 gvidrezolucion de nia kongr., *Dziennik Ludowy*, Lwow, 1. 8., dediĉas tutan paĝon al esp. movado. *Daily Herald*, London, regule trifoje dum la semajno presigas kolonon! (Ofte en ŝprita formo).

Fluganta Skribilo dumonata stenografa gazeto, eldonis varbilon "Fariĝu Stenografisto", senpage haveblan ĉe la aŭtoro: P. Flageul,

9 Bd. Voltaire, *Issy-les-Moulineaux*, Seine Francio. (Temas pri esp. stenografio laŭ la sistemo Duployé-Flageul).

La SAT-Propagandisto, Doolhof 3, Helder, Nederlando, aperas de nun tripaĝe kaj estos informilo kaj pliperfektigilo por laborist-esp-istoj. Ĉiuj nederlandaj k-doĵ estas petataj kunlabori. Ni gratulas pro la progreso kaj pro la fervora penado!

Esperanto kaj la IFTU. La Sekt. de la IFTU. Oudegeest konsentis enmeti longan respondon al la artikolo de k-do Dubreuil (Vidu N-ron, 48). Ĝi aperos en "Internacia Laborist-Sindikata Revuo" Okt./Dec., N-ro 4 Vol. V. Atentigu estrojn kaj sindikatanojn pri ĝi.

Kamaradoj!

3-a Tutmonda Esperantista Kongreso okazis en Cambridge (Kembriĝ) en 1907 jaro preskaŭ samtempe kun la Internacia Socialista Kongreso en Stuttgart (Ŝtutgart). La revolucia sekcio de la unua sendis al la dua per helpo de kelkaj komunaj anoj de ambaŭ kongresoj (ekz. k-do W.W. Padfield kaj aliaj) ellaboritan de ĝi kaj prese eldonitan alvokon en 4 lingvoj (sur apartoj folioj): Esperanto, angla, franca kaj germana.

Cu iu konservis kelkajn ekzemplerojn de l' Alvoko? Se iu konservis kelkajn, bonvolu sendi por ĉiam aŭ por tempa uzo po unu de ĉiu speco.

Se iu konservis nur unu, bonvolu sciigi pri tio kaj, se ni povos, ni evitos ĝian uzadon, sed, se ni bezonos, ni petos vin sendi ĝin al ni por tempa uzo kun garantio.

Se iu konservis plenan kolekton de "l' Esperantiste" (franca, de Beaufront) dum ĝia amfibia spirado per Esperantaj pulmoj kaj per aliaj blankoj, bonvolu sciigi la Redakcion pri tio. Pri ĉi-supro petas kaj tion bezonas aparte k-do N. P. Evstifeieff. La Redakcio.

La Protokolo de Ĝenevo

"For la militon!" tia estis la signalo de la V. Kongreso de la Ligo de Nacioj kaj de Herriot kaj Macdonald kiel gvidantoj, kiam ili kreis tiun Protokolon de Ĝenevo. (Ĝenevo, urbo en Svislando, sidloko de la Ligo de Nacioj). La enhavo de citita akordajo klopodas anstataŭi la tiamajn ŝancojn en la epoko de la kapitalismo interpuŝi la ŝtatojn inter si kaj per tio eksplodigi novajn militojn. Anstataŭi ilin per la Arbitracio.

Ĉar mi estas konvinkita, ke tiu ĉi lasta problemo estas interesa por la laboristaro, jam pro la demando, ĉu ĝi estas solvebla en tiom larĝa amplekso, kiom necesas sekve de la progresinta internaciigo de ĉiuj rilatoj (ŝajne nur naciaj) — tial mi volas ĉi-tie doni etan studon de la teknikaj punktoj de la Protokolo de Ĝenevo, provo de solvo tiaspeca jam en kapitalista epoko.

La Protokolo ne estas novaĵo. Ĉar ĝi devenas rekte de la Pakto de Ligo de Nacioj, kiel ties dispono administracia celante klarigi kaj faciligi la enhavon kaj aplikon de la Ligopakto. Ĝi montras la samajn ĉeftraĵojn: Reduktado de la armilaro, reguligo por malebligi ĉiajn konfliktojn internaciajn, konservado de la netuŝebleco kaj de la memstareco ĉiŝtataj.

Sed kelkparte ĝi eĉ plivastigas la ligo-paktan ekzekutivpovon.

Arbitracio, sekureco kaj malarĉado, jen tio al kio aludas ĝia enhavo.

La Ligopakto fondis la Juĝejon Internacian (Haag), sed ties kompetento estis

limigata. Ĝi nur rajtis interveni en kelkaj kazoj kaj ankaŭ nur, se la ŝtato, kiun koncernis la konflikto prijuĝota, memvole postulis tion. Ekzistis ekz. tiom da tiel nomitaj "naciaj problemoj" (enmigado), por kies solvo la juĝejo citita ne estis kompetenta.

Tiurilate la Protokolo tekstas alimaniere: La Juĝejo Internacia estas en difinitaj kazoj devige kompetenta. La aliaj kazoj de konflikto la ŝtatojn en ili implikitajn devigas nomi juĝejon de arbitraciuloj. Se ili ne akordiĝas, la Konsilantaro de la Ligo rajtas unue doni konsilojn aŭ rekomendi arbitracion, kiun ili povas akcepti aŭ ne. Sed se iu el tiuj ŝtatoj postulas, la Konsaro rajtas validigi tiun arbitracion. Se neniu ŝtato postulas arbitracion, la Konsaro juĝas mem, kaj elparolata unuanime, ĝia decido estas definitiva. Se ne unuanime, la Konsaro fondas komitaton arbitrecan kies juĝo same estas definitiva. La ŝtatoj volas prezenti sian konflikton al la Konferenco de la Ligo, ili povas fari tiamaniere, sed ties decido jam fariĝas ekzekutiva per nura plimulto da voĉoj.

Tia procedo de prikonsilado daŭras longe, sen dubo, kaj iu ŝtato atakema povas profiti el tio pliperfektigante sian armilstaton. La Protokolo malebligas tion komisiante la Konsaron intertempe kontroli kaj subpremi, se necesas, la armilaron de l' suspekta ŝtato.

Jen la aparato arbitrecan. Sed kion fari, se ĝi ne sukcesas paceme, se iu potenco malobeas?

Nu, la Protokolo enhavas tiel nomitajn

sankciojn. Ila aplikado ne estas sendanĝera, kaj la Ligopakto eĉ permesis, eble pro tio al ĉiu ŝtato partopreni je la efektiviĝo de ili laŭ sia mezuro aŭ ne partopreni.

La malfacilaĵo troviĝas en la koncepto "Atakanto". Kiu estas do atakanto? La Protokolo klare priskribas tion: Kiu deklaras la militon, kiu difektas la devojn de la Pakto aŭ de la Protokolo, kiu malrespektas la tiel nomitajn "Zonojn neŭtralajn" (jen novaĵo: la Protokolo postulas krei tiajn zonojn en la distriktoj plej danĝerecaj pro iliaj konfliktebloj, ekz. Rejnlandon inter Germanio kaj Francio, Vistullandon inter Germanio kaj Polio ktp.).

Kaj en la kazo de nura supozo je atakemo ĝi postulas ekzamenadon. La ŝtato suspekta estas konsiderata kiel atakanto, se ĝi ne emas paceme akordiĝi pri la konfliktaĵo, se ĝi ne obeas la decidon arbitrecan, se ĝi ne akceptas iun decidon, deklarante la aferon kiel ekskluzive nacia en favoro de sia kontraŭulo (ĝi ja estus povinta peti la Konferencon de la Ligo je interveno (ekzamenado ktp.), se ĝi malatentas la disponojn de la Ligo en la intertempo de ĝia ekzamenado kaj kontrolo.

Se protestas la ŝtato kondamnata, de sia stato de akuzo ĝin nur povas liberigi unuanima konsento de la Konsaro.

Atakanto same estas ti-kui malakceptas eventualan armisticon aŭ kiu malrespektas la kondiĉojn de la armistico surmetita. Du trionoj da voĉoj de la Konsaro sufiĉas por deklari ĝin tiel.

(Finota.)

SAT-ano 300.

Tiu ĉi numero de "La Lernanto" estas grandparte dediĉita al "Petro", la heroo de nia kursa lernlibreto, kiun ni varme rekomendas al ĉiuj, kiuj ne jam posedas ĝin por perfektigo kaj por nova kursoj laŭ parola metodo.

Ni opinias, ke la libro havas valoron por ĉiu kursgvidanto, kiu havas la ambicion kaj la sinceran deziron, tre rapide kaj laŭ instrumetodo agrabla por la lernantoj, instrui la esp.-lernemulojn. Ni opinias, ke ne nur la plej, plej lertaj faru la provon laŭ "Petro", sed ke ĉiu instrumulo kuraĝu entrepreni tion sen timemo, almenaŭ ĉiu, kiu jam gvidis iun kurson, do sufiĉe scipovas la lingvon. Certe li baldaŭ plezure konstato, ke la lernantoj mem plej vigle subtenas lin en lia klopodado, ĉar ilin interesas la enhavo de la libreto, kaj la intereso kreskas kun ĉiu paĝo, ĉar ankaŭ la kapableco de la lernanto interesata kreskas ja kun ĉiu paĝo. Ni havas la ideon, ke ni liberigas nin de malnovaj tradicioj, kiam ni instruas laŭ "Petro". Ni forpelas de ni iun pezan aparaton, kiu ŝarĝis sur ni, kiam ni uzis la gramatikajn lernlibrojn. Ni ne plu estas tiom ligataj al la instrumaterialo fiksitaj unusence de la lernlibraj aŭtoroj, kiom ĝis nun, kiam ni uzis la gramatikajn lernlibrojn. Ni havas pli da libereco en la instruado. Sed tamen ni ne forgesu, ke ni havas la saman respondecon. Ni pravigu la juĝojn de la esp. gazetaro! "Heroldo de E." skribas: "La libro certe bonege taŭgos por la difinita celo kaj supozeble helpos krei bonajn scipovantojn de Esperanto". Kaj "Svenska Arbetar-Esperantisten" konfesas, ke "ĝi estas skribita per facila kaj bonega esperanto-stilo kaj estas tre valora por kursgvidantoj aŭ por ili kiuj volas sin perfektigi en la lingvo." Nefavoran impreson nur havis la redaktoro de "Arbeiter-Esperantist", kiu opinias, ke sole por progresintaj kursoj oni povas utiligi la libron, sed nur en esceptaj okazoj jam por komencantoj. — La sperto montros, ĝis kia grado ankaŭ komencantoj sukcesos ellerni la lingvon laŭ "Petro".

Petro en la zoologia ĝardeno

Leginte "Petro"-n, vi certe havas la deziron, scii novajn detalojn el la vivo de Petro. Tial ni konigas al vi ankoraŭ jenajn scenojn, pri kiuj ni aŭdis:

Vi volas scii, kion la knabo Petro faris, kiam li havis liberan posttagmezon. Li demandis siajn gepatrojn, ĉu li povas viziti la zoologian ĝardenon, por rigardi la bestojn. La gepatroj respondis malĝoje, ke ili ne havas la necesan enir-monon. Petro diris, ke li estante infano¹⁾ nur bezonas pagi "dudekon", kaj ke lia onklino donis al li tiun sumon por la tramveturo. Sed li kuris piede kaj tiel ŝparis la monon.

¹⁾ Anstataŭ "estante infano" oni ankaŭ povas diri: "Kiel infano" aŭ "ĉar li estas infano".

Tiam Petro povis iri. Tamen Petro ne iris sola, sed kun sia fratino kaj sia amiko. Unue ili rigardis la rabobestojn, la leonon, la tigron, la panteron kaj la ursojn. Poste ili rigardis la kamelojn kaj la elefantojn. Sed plej longe ili rigardis la simiojn en iliaj kaĝoj. Ili gimnastis kaj faris kuriozajn grimacojn. Petro pensis, ke lia parto diris al li: Ni homoj tre parencas al la simioj. Petro nun esploris tion kaj konstatis, ke lia patro estas prava. Li estis mirigita pri la multaj homecaj trajtoj, kiujn montris la simioj en sia agado. Tamen, ĉar la sperto pri parencado inter homo kaj simio ne estas favora por la religiamantoj kaj malsaĝigantoj de la homaro, la pastroj kaj ĉiuj anoj de la reakcio malŝatas la progreseman sciencan kaj klopodan, per malbonaj rimedoj falsi la Veron.

Dum la bano

Vi volas scii, kion la knabo Petro faris, kiam li havis liberan posttagmezon, kaj estis varmega vetero. Petro iris bani en lago tre proksima. Li estis lerta naĝanto, kiu naĝis grandajn distancojn kaj ne rapide laciĝis. Ĉar li hardis sian korpon laŭ la devizo: Sana spirito en sana korpo. Sed malbonaj buboj estis ĵetintaj en la akvon apud la rando de la lago rompitajn potojn kaj botelojn. Petro ne sciis tion, kiam li alproksimiĝante al la bordo, vadante tra la malprofundaĵo, subite eksentis akran doloron en la piedo. Tuj levante la piedon, li rimarkis larĝan ŝiraĵon triangulan. Rapidege li rampis sur herbaĵon dense apud la bordo, eksidis kaj kunpremis la vundon forte sangantan, dum unu kamarado venigis sanitariston por bandaĝi sperte kaj zorgeme la difektitan membron. Surŝulte rehejmigis lin la plej granda el liaj kamaradoj. Poste la doloro fariĝis iom pli forta, sed li sukcesis dormeti kelkajn horojn, kaj post la dormado jam preskaŭ tute forpasis la doloro. Nun Petro kelkajn tagojn ne povis forlasi la domon kaj kuŝis sur sofo aŭ en lito, legante librojn, en kiuj laboristoj rakontis pri sia propra sorto kaj pri la suferoj de siaj laborfratoj, pri minejoj kaj ferfandejoj, ŝtonhakistoj kaj maŝinhejtistoj. Petro pensis pri siaj laborantaj gepatroj kaj perdis larmon el la okulo.

Nokta vidaĵo

Mi iras sur dezerta vojeto de altaĵo. Ĉirkaŭ mi ĉio estas volvita en la ombroj de l' nokto. Murmuras mallaŭte la folioj de l' arboj sian kanton ĉiunoktan.

Antaŭ mi sterniĝas la urbo. Strange — kial ĝi do tie transe brilas en miloj da lumoj? Estas ja nokto, la tempo, kiam ripozigu la homo la labore lacigitan korpon.

Mi profundē enpensiĝas. Jen alsonas zumado, ĉiam plilaŭtiganta. Mi aŭdas interbabiladon de gajegaj homoj. De tempo al tempo enmiksiĝas dolĉa muziko.

Kaj la aero pleniĝas per laodoro de bonaj manĝaĵoj kaj vinoj. . . .

Kio estas tio? Maldormas homoj, estas gajaj, bonmanĝas. Kiuj estas tiuj, ĝuantaj tiel la nokton?

Mi konstato, ke en tiu brilanta kvartalo situas la amuzejoj kaj drinkejoj de l' burĝularo. Kaj nun klariĝas al mi ĉio. Tiu klaso diboĉas nokte, ne sentante dormemon, ĉar ĝi ja mallabore travivas la tagon. Havigas la monon al ili ĝoje aĉa homaro, kiu opinias favoro havi la rajton por fari tion. Kaj la oro, la rezulto de ties penado estas elspezaĉata senskrupule. — Fi. Minacante mi levas la pugnojn kaj deturnas mian kapon. —

Serĉas miaj okuloj nun ion ekkoneblan en la cetera parto de l' urbo. Ĉio estas nigra tie. Nur la steloj alte sur la ĉielo sendas etan brilon malsupren. Malprecize distingiĝas la konturoj de kamentuboj fabrikaj.

La kvartalo de l' proletaro! Kiaj sonoj jen penetras al mia orelo? — Ĉu ne estas la ĝemado de suferantaj homoj? Ĉu ne estas la kriado de miloj da infanoj, kiuj malsate sin turnas en la lito, tremetiganta la aeron? Kaj odoras mucide laŭ malvastaj, aĉaj loĝejoj. . . .

Mi malgajiĝas. Kial do la mondo tiel diferencigas la homojn? Ĉu ne povos fariĝi aliel? — Certe, mi konkludas: se ĉiuj inter la suferantoj, kiuj portas ankoraŭ la ĉenojn de burĝa ideologio, venus sur tiun ĉi altaĵon, lasante al si efiki la noktan vidaĵon. Tiam ankaŭ ili konsciĝus kaj ne plu barus al la batalantaj samuloj la vojon al liberiĝo!

La tintoj de proksima turhorloĝo min elrevigas. Mi foriras, la tempioj ardantaj. Sed tie transe ankoraŭ brilas la urbo en miloj da lumoj. E. M. (1072)

Per kio oni povas ofendi esperantiston

Se vi volas inter spertaj esperantistoj estonte mem spertulo, ofendi kamaradon, vi intence dum parolado diru pri tiu ĉi kamarado "ĝi" anstataŭ "li": ĝi amas, ĝi legas, ĝi fumas. Kamarado nepre ofendiĝos, ĉar "ĝi" oni uzas por la bestoj kaj objektoj. Kuŝkov.

JUNA

NOVEBAKITA ESPERANTISTINO

Kanjo, bela knabineto,
Mia kara fratineto,
Amas ĉiam ŝi ludante,
Paroladas esperante,
Ŝi parolas dum manĝado
Kaj babilas dum irado.
Kiam estas ŝi dorminta . . .
Esperante parolinta . . .
"Frezeziĝis mia Kanjo!"
Tiel diris ŝia panjo
Kaj disŝiris ekzercaron
Kaj ceteran libran aron.
Tro malfrue, kara panjo:
Fratineto, mia Kanjo,
El vortaro jam parkere
Sciis ĉiujn vortojn vere. B. Kuŝkov